

*Prof. Beck*

# KIO ESTAS MONISMO?

PAROLADO DE  
PROF. D.RO PAUL BECK

---

ESPERANTIGITA DE  
KURT HUBRICHT

707233 - A

## Antaŭparolo

---

Ĉar oni ofte aŭdas la opinion, ankaŭ en la rondo de liberpensuloj, ke la monismo estas precipa filozofio, mi tradukis en esperanton la bonegan paroladon "Kio estas monismo" de prof. d.ro Beck, Leipzig, estrarano de la germana monista ligo. Ankaŭ ĉi tie dankon al s.ro prof. Beck pro sia tradukpermeso.

Per eldono de tiu broŝureto mi esperas servi al niaj grandaj idealoj, al la libera penso kaj al la esperantismo.

*La Tradukanto*

La respondojn je la demando, kio estas monismo, vi ne povas ekkoni el la nomo monismo. Estas simile, kiel kun la esprimoj katolikismo kaj protestantismo. En la dua kaj tria jarcento de nia kronologio, deklaris sin la episkopa eklezio, kontraŭe al la sektoj, la universala, la katolika eklezio kaj tiu nomo, kiu dankas sian naskiĝon precipe al historia situacio, konservis sin jarcentojn kaj jarmilojn por precipa vivdirekto kaj pieco. Protestantoj nomis sin grupo je la parlamento al Speyer, kiuj protestis kontraŭ plimulta decido de la parlamento. Ankaŭ tiu nomo disvastiĝis ĉirkaŭ la tuta tero, kiel predikato por religia komunumo.

Kiel la nomoj katolikismo kaj protestantismo ne prezentas la tutan enhavon de la katolika kaj protestanta vivrigardo, sed nur esprimas la kontraston kontraŭ aliaj spiritaĵoj movadoj de certa tempo, tiel ankaŭ la nomo monismo. Nia ligo — la germana monista ligo — transprenis la nomon, kiu jam estas uzita pli frue por filozofia scienco, kiel kontrasto al dualismo, la kredo al du mondoj. La nomo monismo devas signifi, ke ni nur konas unu mondon, la mondon en kiu ni vivas kaj agas. Aliajn filozofiajn sekretojn vi ne devas supozi en la nomo.

Per tio estas jam dirite, ke la monismo ne estas nova filozofio, ke ni ne estas en posedo de scioj kaj ekkonoj, kiuj mankas al aliaj homoj. La monismo estas spirita movado, precipa vivopinio, voldirekto. Ĝi naskiĝis kun la unuaj komencoj de scienca pensado, kreskis dum la jarcentoj kaj prenis en 19a jarcento potencon amplekson; certe estas, ke la subtenantoj de tiu evoluo ne estis ĉiam klaraj pri sia volo. Ni intencas nun tiun vivrigardon, tiun voldirekton organizi en firmajn formojn.

En kio konsistas tiu voldirekto tiu vivrigardo? Mi volas ĝin signifi, kiel volo al realeco. Kompare kun la 18a jarcento, oni povas rakonti de la 19a jarcento multe da malagrablaĵoj. La 18a jarcento estis tempo de spirita liberigo, liberigo de superstiĉo kaj antaŭjuĝoj, la 19a jarcento estis ofte reakcio. Sed la 19a jarcento meritas gloron koncerne al ekonomiaj kaj spiritaj aferoj. Estis tempo de radikala sento al realeco. En neniu pli fruaj jarcentoj estis tiel multe demandita kaj esplorita: kio estas efektiva? Al tiu celo estis pesata, mezurata, observata, kalkulata, eksperimentata, oni konstruis ĉiam pli perfektajn pesilojn, mikroskopojn kaj teleskopojn, trafosis la teron, por sperti, kio estas sub la tero, por trovi la restaĵojn de malnovaj plantoj kaj bestgentoj kaj por esplori la evoluon de la homa raso, balonoj kun observadinstrumentoj veturis en la plej altajn aerajn, trenretoj malleviĝis sur la fundon de la maro, ĉiuj neesplorataj landoj mem la glacikovrataj polusoj estis la celoj de multnombraj ekspedicioj. Malnovaj kulturejoj de la homoj estis elfosataj, ĉiuj arkivoj kaj bibliotekoj estis traserĉataj kaj tiu febra aktiveco nur por respondi la demandon kio estas efektiva, kio estis efektiva pli frue? Senindulge detruis la esploro malnovajn honorindajn tradiciojn kaj karajn antaŭjuĝojn. La esploro ne demandis, kiel devas esti la mondo, por ke ĝi al ni plaĉu, por ke ni en ĝi bonsentu; ĝi ne demandis al feliĉo kaj malfeliĉo, ĝi nur demandis kio estas efektiva. Estas principa diferenco je la voldirekto de homo, ĉu li demandas kiel mi deziras al mi la mondon kiel devas esti la mondo por ke plenumiĝu miaj esperoj, por ke mi havu forton en vivo kaj trankvilo en mortado, aŭ ĉu li diras, unue mi volas scii, kiel estas la mondo efektive, tute sendependa de miaj deziroj kaj esperoj, de miaj klopodoj al feliĉo kaj animbezonoj kaj laŭ tiuj scioj mi faros mian vivon.

La historio informas, ke la deziroj kaj la animbezonoj de la homoj estas treege ŝanĝeblaj. Ili estas ĉe izolaj homoj

plejmulte restoj de infanmemoroj, ĉe pli grandaj grupoj memoroj al la infaneco de la raso, ĉiam li reiras je la estinteco. Ili ligas la homon interne, al la valoroj de la estinteco kaj li devas porti la ŝarĝon de estintaj jarcentoj. Ĉiam, se la homa spirito kreinta ion grandan kaj novan, tuj eksonis la ĝemado pri la detruo de antikvaj sanktaĵoj, ĉiu prospero estas batalita en la nomo de la animo. Ne ekzistas iu reakcia movado de la estinteco kaj estanteco kiu ne estus alvokinta la animon.

Oni ofte diras, ke la homo, suferus ĉe la nevalita aspekto de la realeco. Oni diras ke la realeco estas malvarma kaj malagraba, ke oni ĝin devas vuall per iluzioj, por ke la homo ne perdu la internan feliĉon kaj konstanton por sia vivo. Flugante el la realeco en sorĉitan mondon la homo gajnas internan trankvilon, nur kun trompoj kaj iluzioj oni povas malsovaĝigi la beston en la homa naturo.

Mi parolos pri tiu poste, ĉu homa feliĉo kaj la homa societo ne estus harmonia kun senindulga akcepto de la realeco, ĉu iluzio, trompo kaj mensogo estus la necesa fundamento de ĉiuj homvivoj. Tiu dogmaro ne estas praktike efektivebla. Eĉ infanoj ne lasas sin trompi je la daŭro, ankoraŭ malpli popolo, kiu prenis mem la gvidon de sia sorto en la manon.

Ni nur volas akcepti la realecon. Kiel ni ekkonas tiun. La monismo respondas pri tio: per scienco, per sciencaj metodoj de observado kaj pensado.

Ĉio, kio la homon diferencigas de la besto, ĉio granda, kreita de la homo, la uzo de la iloj, lingvo, moroj, juĝo ne estas la faro de izolaj homoj, sed de la homaj societoj Ankaŭ la ekkono de la realeco estas sociala aktiveco de la homoj. Kiel ekkonus la izola homo la realecon malligite de la societo kaj de la spirita heredaĵo de l'estintaj jarmiloj? De siaj bestaj prapatroj li heredis la sentojn. Por malrapida evoluo akomodigis la bestoj sian korpon al la de ek-

stere venantaj incitoj por ne ekkoni la realecon, sed nur por trovi la nutraĵojn kaj sin ŝirmi kontraŭ danĝeroj. Ĉu la sentoj, kiuj nur en servo de praktikaj interesoj sin formis, estas kapablaj, ekkoni la mondokazigon? Estas fakto, ke la homaj sentoj estas malmulte kapablaj, ili vidigas al ni nur malgrandan eltranĉon el la realeco kaj ankaŭ tiun nur vualata. La scienco klopodas la sentojn de la homoj ĉe la ekkono de la realeco laŭeble ne atenti. Estas la sama, kiel ĉe la tekniko. En la maŝinoj la homoj kreis novajn muskolojn, kiuj estas pli kapablaj ol tiuj de la izola homo.

Levilego, levante lokomotivon, estas brako de la homa societo. La laboristo, kiu al la levilego laboras, nur faras per malforta premo elektran kuniĝon. Simile estas kun la sentoj. La plej perfekta sento kiun ni de niaj bestaj prapatroj heredis, estas la okulo. Sed kiel malmulte ĝi estas kapabla! La okulo ne estas akceptema por la milona parto de la energio trafluanta la mondon. Leonojn kaj tigrojn ni povas vidi, sed ne niajn malbonajn malamikojn: la bacilojn. Nun kreis la homa societo novajn okulojn, anstataŭigis la retinon per fotografaj platoj, ĝi kreis la lensosistemon de la teleskopoj, mikroskopoj kaj ultramikroskopoj. La turoj de stacioj por radiotelegrafio estas okuloj per kiuj la societo vidas lumon de la ondlongo de kelkaj metroj; kun aliaj okuloj ĝi vidas la Röntgenradiojn en la ondlongo de 100 miliona milimetro. Kun tiuj okuloj, kiuj kreis la kunlaboron de diversaj popoloj, ni vidas hodiaŭ ne nur la bacilojn, ni vidas ankaŭ la atomojn, kiujn oni rigardis pli frue kiel la nepartigeblajn erojn de la mondo; ni vidas eĉ en la internon de la atomoj. Per la okuloj de la homoj ni vidas ankaŭ stelojn, kiujn ne vidis kaj ne vidis homa okulo, ni ne nur vidis ilin, ni observadas ilian temperaturon, ilian kemikan substancon kaj rapidecon.

La izola homo, elprenita el la sociala interrilato estas tute nekapabla percepti la realecon. Eĉ se ĉiu izola homo havus la necesan spiritan talenton, tiel estas do la plej multaj, tro okupataj de metio kaj la postulo de la tago, ke

ili ne povas mem ekkoni la realecon. Ankaŭ la esploranto, subtenata de la societo por dediĉi sian tutan vivon al la ekkono de la realeco nur povas hodiaŭ regi pri malgranda parto de la scienco, je la aliaj li estas dependa de siaj kunlaborantoj. Nur la organizata kunlaborado de la esplorantoj prezentas la kono-progresadon de la homa societo.

La homa korpo estas ĉelŝtato. Ĝi konsistas el multaj milionoj da ĉeloj. En maro naĝas multege da tiaj ĉeloj, kiel individuoj. Ĉiu devas mem prizorgi la nutraĵon, la digeston, la plunaskadon. En homa korpo prizorgas kelkaj ĉeloj la movadon, aliaj la digeston, aliaj la vidadon aŭd-  
adon kaj flaradon. La besta evoluo konsistas el tio, ke la ĉelŝtato per ĉiama labordisdivido sin akomodas al la ĉirkaŭaĵo, dum la homo estas daŭrtipo. La homo de jarmiloj, ŝanĝiĝis korpe nur malmulte. La homa societo ne la korpo de homa individuo sin akomodis ĉiam pli kaj pli al la eksteraĵo. Ne la muskoloj kaj sentoj de homa individuo pliperfektigis, sed la muskoloj kaj sentoj de la societo, la ilaro, maŝinoj kaj instrumentoj pliperfektigis. Tiel ankaŭ ne prosperas la labordisdivado en la ĉelŝtato sed en la societo. Tio ne nur valoras por la ekonomio, sed ankaŭ por la ekkono de la realeco. La astronomo kun teleskopo, la medicinisto kun mikroskopo, la fizikisto kun ultramikroskopo estas la okuloj de la societo, la kemiisto, kiu analizas kaj provas la ŝtofojn estas nazo kaj lango de la societo.

Per tiu sociala laboro estas la realeco al la homo alir-  
ebla, treege plivastigita. Por grandaj partoj de la mond-  
okazo, ekzemple: la elektro, la homo ne posedas organon. Por tiu devis krei la societo artajn sentojn. Neniu homo kaj eĉ se li posedus la plej bone organizitan cerbon, povos akcepti la riĉecon de la realeco al ni konata. Tion povas nur la homa societo. Nur la homa societo povas efektivi-  
gi la akomodon de la pensoj al la realeco. Kiel estas ako-  
moditaj la fiŝo al la akvo kaj la birdo al la aero kaj kiel la besta korpo ŝanĝiĝas se ekzemple el akva besto fariĝas

terbesto, tiel ankaŭ la homoj devas aliĝi la koniloj kaj pensadiloj, se estas necesa akomodo al novaj realecoj. Ankaŭ tio superstaras la povon de la izola homo. Per la kunlaborado de multaj miloj da scienculoj el ĉiuj kulturpopoloj, dum la lastaj jarcentoj la potenca penssistemo de la scienco estiĝis, kiel lingvo kaj rajto, rezultoj de sociala laboro.

Je la konvinko, ke la izola homo ne estas kapabla ekoni la realecon, ke la ekkono de la realeco estas sociala aktiveco, rigardas la monismo nur tion, kiel realecon kaj fakton, kio estas esplorita de la scienco kaj de tiu klarigita, kiel reala fakto. *La monismo akceptas nur tiujn konojn kaj doktrinojn, kiuj interkonsentas laŭ sciencaj juĝoj kun la faktoj.*

Ni scias, ke la scienco longan tempon eraris, sed la scienco posedas sufiĉe da kontrolorganoj por korekti faritajn erarojn kaj je unu eraro de scienca pensado venas mil eraroj de nescienca pensado. Ni scias, ke la scienco nuntempe ne povas respondi ĉiujn demandojn, sed neniu respondo estas pli bona ol malĝusta respondo. Ni scias, ke la scienco malgraŭ siaj treegaj sukcesoj ankoraŭ havas multajn mankojn, sed tiuj mankoj fariĝos ĉiam kaj ĉiam pli malgrandaj, je granda doloro de tiuj, kiuj pro la manko de la homa scio ĝojas, ĉar ili ŝatas la spiritan nebulecon.

Se la monismo akceptas nur la faktojn kiel realecon, kiuj estas eltrovitaj dum la kuro de jarcentoj kaj kontrolitaj per sciencaj metodoj, tiel konkludas el tio samtempe la malakcepto de ĉiuj laŭdiraj faktoj, dogmoj kaj pensoj, kiuj naskiĝis je alia vojo. Tiel longe ne ekzistis scienco, provis la homo en alia maniero esplori en la internon de la naturo. Per interna vidado, per instigo de la pasioj, per ekscentreco provis la homo interrilatiĝi kun la interna naturo. Sennombraj mistikuloj kaj profetoj havis la opinion, ke ili posedas ĉefan organon, internan senton per kiu ili povas ekvivi novajn realecojn. Sed neniam prosperis la homa scio de la realeco sur tia vojo. Dum la fiera konstruo de la sciencoj malrapide sed ĉiam kreskis, dum en ĉiu generacio



la laboro de la antaŭirinta daŭrigis, ni vidas en tio dirita nur kontraŭdirojn sen ia eblo de kontrolo. La realeco de travivaĵoj de la mistikuloj ne estas duba, tiuj travivaĵoj estas afero de la scienca esploro, nur la *graveco* de tiuj religiaj travivaĵoj, kiel rimedo al ekkono de la realeco, estas laŭ la ĝis nun faritaj spertoj tre duba. En nia regiono ĉie superstaras malnovaj kasteloj, en niaj moroj vivas ofte la restoj de malnovaj kulturoj, nia korpo havas multajn rimarkilojn, kiuj estas kompreneblaj nur kiel heredaĵo de niaj plej antikvaj bestaj prapatroj. Tiel ankaŭ postlasis la estintaj gentoj postsignon en nia animvivo kaj tre ofte trarompas la pensado kaj sentado de pasintaj tempoj la maldensan supraĵon de nia kulturo. Kiel en la okulo de la ĉevalo la fajro de antikvaj stepoj lumas, tiel ankaŭ vivas en kelkaj homoj la plej malnova estinteco de nia raso.

La monisto amas pasie la klarajn pensojn. Kie estas do la ekkonoj, kiujn la laŭdiraj profundaj pensuloj alportis al la homaro? Estas preskaŭ ĉiam la provoj, antikvaj superstiĉoj vestigitaj en modernan vestaĵon. Unuflanke ni havas la fieran konstruon de la scienco, plena de lumo, klareco kaj pura aero, la grandan mondon kies fundamenton konstruis Newton, Kopernikus kaj Galilei, kies pliperfektigon antaŭvidis Giordano Bruno — aliaflanke la tielnomataj profundaj spirituloj, la spiritistoj kun siaj fantomoj, la patologiaj ravigaĵoj de la sanktuloj, la misteraj instruoj de la pastroj.

Miaj ĝisnunaj diroj volis klarigi la frazon de nia programo: "la monista ligo estas ligo por scienca mond-rigardo. La scienco ne estas la privatafero de iuj homoj, ĝi ne estas lukso de homa prudento, sed ĝi estas unu el la plej gravaj agadoj de la homa societo: La scienco estas la organo de la homa societo al ekkono de la realeco kaj kiel la vivo de la besto sin bazas sur aktiveco de la sent-organoj, tiel estos fondata la homa vivo kun kreskanta kulturo sur la scienco. Poŝton kaj fervojon prizorgas

oficistoj subtenataj de la socioj, sed illa celo estas la komuneco. Dum ankoraŭ antaŭ malmultaj jaroj la provoj, la rezultojn de la scienco, fari atingeblaj por la komuna publiko estis kondamnitaj kiel degradigo de la scienco, oni nun ekkomprenas ĉiam ĝenerale, ke nur sur tiu vojo la grava sociala tasko de la scienco povas esti plenumata kaj ke apud la nura esploro, la formuligo de la trovitaj ekkonoj en popolkomprenbla maniero estas ago de tre alta graveco. Ĉiu, kiu per sia laboro en la formo kunhelpas al konservo de la socio, havas la rajton ankaŭ partopreni en la rezultoj de la scienca esploro, kiu estas subtenata de la socio. Ni postulas pro tio, tuj kiam Germanio estos en bona ekonomia stato, favorigon de la scienca esploro, ni postulas klerigejojn, kie al junuloj kaj maljunuloj estos ebligata partopreni en la progresoj de la scienco.

Ĝis nun estis la scienco sekreto de malmultaj. Ĝi estis skribita en sekreta lingvo, nekomprenebla por la popolo. Kiam Haeckel en facilkomprenebla maniero al la popolo klarigis la sciencon, koleris la reakciuloj. Oni volis ja konservi al la popolo la religion. Ni volas konservi al la popolo la sciencon, aŭ pli ĝuste ni volas, ke la popolo la sciencon ĝenerale ricevas. La malfacileco de la scienco ne estas argumento kontraŭe. Kie estas volo, tie estas ankaŭ vojo. Ankaŭ en Germanio ekkonis eminentaj esplorantoj la signifon de la scienco kiel sociala funkcio kaj prezentis la rezultojn de illa esploro en modela maniero al la tut-homaro. Mi memorigas al Ostwald kaj Müller-Lyer. Nenio en la tuta scienco estas tiel malfacila kaj nekomprenebla kiel la dogmoj de la eklezio kaj tamen volas tiuj, kiuj diras, ke la scienco estas tro malfacila por la popolo, la dogmojn de la eklezio instrui jam al infanoj. La ĝisnuna ŝtato ne rigardis la sciencon, sed la eklezion kiel socialan organon al ekkono de la realeco. La ŝtato elspezis multe da milionoj por siaj regatoj; ĝi instruis ilin ĉiudimanche pri la

laŭdira transa mondo. En la lernejoj estis malpermesita la tezoj de la scienco, kiujn depost jarcentoj neniu prudenta homo pridubas. La monista ligo kiel kontraŭulo de la eklezio, kontraŭulo de ekleziaj organizaĵoj, kontraŭulo de ekleziaj instruoj, kontraŭulo de la tuta eklezia vivrigardo postulas liberigi la lernejon el la eklezio kaj akcepton de la scienco kiel solan aŭtoritaton por la lernejo.

De kiam Kopernikus instruis, ke la tero ne estas la mezpunkto de la mondo, konfirmis la tuta esploro, ke ne estas kaŭzo por la opinio, ke la mondo ekzistas pro la homo. Estis senfinaj tempoj kiam ne ekzistis homoj kaj se la tero rondirigos ĉirkaŭ la malheligota suno ne ekzistos plu la homaro. Kiel fulmo en senfina malhela nokto, tiel lumigas la homa konscio en la mondokazo. Oni povas veki kun kelkaj faktoj la ŝajnon, ke la naturo zorgas precipe por la bonstato de la homo, ke la tero estas farita laŭcele por la homo. Sed kun la sama amo zorgas la naturo por la baciloj, kaj faras el la homa korpo loĝejon por la baciloj. Se la homa korpo batalas kontraŭ la baciloj, tiam venkas baldaŭ la unu aŭ la alia. La mondokazado ne zorgas pri la homa mizero, ĝi estas indiferenta, se la baciloj detruas eminentajn spiritajn valorojn. En la naturo ekzistas multaj turmentoj, timoj ktp. kaj estus sarkasmo aserti amo kaj kompato regas la mondon. La homo ne havas kaŭzon, diri "patron" al la mondokazado.

Ne estas kaŭzo la mondokazadon imagi persone. La monismo rigardas la mondon ne kiel personan volon, sed kiel nepersonan, nekonscian okazadon. Ni havas la opinion, ke la prediko de la kristoj estas forrigardado de la teruraj aĵoj en la vivo, vualigo de la realeco, memsurdigo, nesincereco. Sed ni ne volas vualigon.

De precipa signifo por la pensado de la tuta eŭropa homaro en la lastaj jarcentoj estis la demando pri la reciproka rilato de korpa kaj spirita okazado. La opinio de la monismo estas: Ne ekzistas science kontrolita fakto ĉe

kiu konscio aŭ spirita okazo aparte funkcias sen iu rilato kun korpa okazo. La monismo malkonsentas la dualismon, materio, spirito kaj rigardas la ideon pri senkorpa spirito kiel restaĵo de antaŭscienca pensado. Per tio neigas la monismo la eblecon de iu daŭrigo de la homo post la morto de la korpo.

Mi nun venas al la dua punkto de nia programo. La monista ligo estas unue ligo por scienca mondrigardo kaj due por scienca vivrigardo.

Kiel ekestis tiu senindulga realecsento, tiu emo al vereco kaj sincereco. Kiel estis do, se en antikva Athen aŭ en la mezepoko estis la pesto. De centoj da altaroj supreniris la fumo al la senkompata ĉielo, la homoj petegis kaj kriis, ili pilgrimis kaj vivis askete, sed kio helpis tion? Ili mortis kaj pereis en la mizero. Kaj ĉar la ĉielo estis malplena kaj neniu dio helpis, la homoj sin mem helpis. Viroj de la scienco kiel Abbe, kiu plibonigis la mikroskopon ke oni povas vidi la bacilojn, Pettenkofer, kiu liberigis la urbon München de la tifo, helpis plu al forigo de homaj suferoj ol ĉiuj preĝoj, almozoj kaj kompatemo. Estas la rezulto de jarcentoj, ke la homo sian feliĉon plej multe prosperigas per tio, ke li rigardas la realecon kun malfermitaj okuloj, ke li studas la leĝojn de la naturo kaj la fortojn de tiu. En malnovaj tempoj estis la naturo al la homo sankta. Sankta estas la ĉefideo de la sklavoj, kiuj estas ŝarĝitaj kun la sento de la dependeco. Ni ne volas esti sklavoj de la naturo, sed ni volas esti regantoj. Por homo, kiu estas vere libera ne ekzistas sanktaĵoj. Ni ne preĝas plu al dio, kiu en fulmotondro koleras; ni mezuras la tensio laŭ voltoj kaj la en la fulmo enhavantan elektroamason laŭ Coulombs. Sur la tomba ŝtono de Franklin la eltrovinto de la fulmforigilo staras la vortoj: Li elŝiris de la ĉielo fulmon kaj de la tiranoj la sceptron. Hodiaŭ estas la fulmo nia sklavoj. Ni pelas ĝin en metalfadenoj kiel obeeman serviston ĉirkaŭ la tuta mondon, ĝi tiras nin sur la stratoj kaj ĝi lumigas niajn loĝejojn. Tiun potencon atingis la homo nur per esplorado de la

naturu; scienco estas potenco. Daŭris longe kiam la homaro iris tiun vojon de la memhelpo. La homo devas sin mem liberigi el la suferoj kaj ĉagrenoj de la ekzistado, neniu dio liberigis lin. Certe la izola homo estas malforta kaj senhelpa. Sed la homo ne estas sola. Li estas ja nur homo kiel membro de la homa societo, kaj la homaro estas forta, forta per ĝia scienco kaj per ĝia laboro.

Mi diris je la komenco de miaj eldiroj, ke la monismo estas la volo al realeco. La risorto de la realecsento en la deknaŭa jarcento estas konata. Estis la volo al potenco kaj riĉeco, la volo utiligi ĉiujn fortojn de la naturo. La scienco ne estas celo por si mem, ankaŭ ne la arto, ankaŭ ne la moralo kaj justo. Estas nur unu celo, tio estas la homo, homa feliĉo kaj bonstato. Moralo kaj justo estas nur rimedo al celo, ili devas certigi la homan komunumon, la arto devas fari la vivon riĉa kaj bela kaj la scienco devas fari la homon potenca kaj forta por batali kontraŭ suferoj kaj malbono. La homo ne estas pro scienco, arto kaj moralo, sed la scienco, arto kaj moralo pro la homo. Ĉu la homo havas lun ajn celon, ni ne scias. Se la mondokazo ŝajnas al ni sencela, tiam ni devas enmeti prudenton kaj sencon. La lasta kaj sola celo de ĉiuj homaj agoj estas la homo mem.

Nun vi komprenos nian frazon "la idealo de la monismo estas homeco." La frazo havas ankoraŭ alian sencon.

Se ni la celon de la naturscienco atingus senreste kaj la homo estus reganto de la naturo, ĉu tiam ne plu ekzistus suferoj? Ne la naturo, sed la homo turmentas la homon. Kiu kaŭzis la teruraĵojn dum la lastaj jaroj? (mondmilito) La naturo? La regado pri la naturo ne sufiĉas, pli grava estas la kulturregado. Sed nun ni aŭdas ree, tio estas sankta lando. Sanktaj estas la ordoj de la ŝtatoj, de la ekonomio ktp. Respekto antaŭ la historiaĵoj, tiel instruis la lernejo, ĉiuj regantoj estas de dio tiel predikis la eklezio. La homo, kiu estas reganto pri la naturo devas resti sklavo de sia estinteco. Ni ne volas esti sklavoj

de la estinteco, sed ni volas esti farantoj de la estonteco. La homaro estas reganto pri ĉiuj aĵoj, estintaj, estantaj kaj estontaj. Ankaŭ koncerne al la kulturregado estas la izola homo senpotenca. Do kiu povas malhelpi la organizitan homaron, ĝiajn ordojn formi plej bonaj por homa feliĉo kaj bonfarto. La idealo de la monismo estas homeco.

Kaj nun mi demandas ankoraŭ foje, ĉu la vualigo de la realeco per trompo kaj iluzioj estas necese?

Mi demandas unue, ĉu vualaĵo estas necesa por la moraleco? Homo, kiu dum la juneco kreskis en la spirito de la scienco, kiu estis instruita pri la homo, naturo kaj homa societo, ĉu tiu nur sekvus al la ordoj de la societoj se li estas timigita per la fabloj de ĉielo kaj infero, dio kaj diabloj?

Mi demandas due, ĉu iluzioj kaj trompoj pri la realeco, estas necesaj por la homa feliĉo. Kion kunportis la religiaj iluzioj al homa bonstato? Oni instruis jarcentoj, ke la homoj iliajn terajn bonstatojn konfidu al dio. Dum jarcentoj estas la homaro instruita, ke ĉiuj suferoj venas de dio, kontraŭ tiuj la homo ne havu la rajton aliigi aŭ ribeli. Tiel longe la kristanoj havis la potencon, ili turmentigis siajn kunhomojn en laŭdira intereso de ilia animosavigo. La religioj ne estas tiel sendanĝera, kiel oni ofte diras. Al ĉiu mistiko aliĝas sangodoro. La ĉefideo de la mistikuloj estas la oferiĝo.

Laŭ la krista legendo mortis Jesuo la oferiĝon kaj la mistikuloj de ĉiuj tempoj celis al la ofermorto. En la lastaj jaroj ni vidis, ke la juneco de la popolo, pro laŭdira servo al pli altaj idealoj, estis pelata en la ofermorton. Ni ne volas aŭdi pri homofero. Ni forigas ĉiujn laŭdirajn idealojn — vivmensogoj — kiuj postulas homoferojn. La idealo de la monismo estas homeco.

La forigo de la religio en ĉiu formo ne signifas doloran perdon de altaj spiritaĵaj valoroj, sed estas liberigo. Ni havas ion pli bonan ol la religion, la sciencon, ion pli bonan ol la kredon, nian prudenton, ion pli bonan ol la diokonfidon, la konfidon al homaro.